

# La Ponto

n-ro 12  
6-a jarkolekto  
decembro 1952

## ESPERANTO, DIE BRÜCKE ZUR WELT

Oficiala revuo de Germana Esperanto-Asocio reg. as.  
Federacio de la Esperanto-Organizoj en Germanio

Preis des Heftes 0,25 DM  
Für Mitglieder kostenlos

J  
e  
l  
a  
M  
e  
m  
o  
r  
o  
d  
e



D  
-  
r  
o  
L.  
Z  
a  
m  
e  
n  
h  
o  
f

La Zamenhof-monumento en Wörgl (Foto Haselberger)

La Majstro mortis — sed vivos lia verko  
La esperantista junularo garantias ĝian venkon en la estonteco

**Internaciaj feriaj kursoj**

„Ho, en eksterlando Esperanto ne estas uzata, lute ne!“ diras nur tiuj, kiuj nenion spertis, nenion travivis kaj nenion scias pri la afero mem.

Sed eĉ ni esperantistoj en Germanio tro malmulte scias pri la E-aranĝoj en eksterlando, ekzemple pri la internaciaj ferikursoj. Ni ja havis ankaŭ tiajn aranĝojn, i. a. 1951 en Konstanc, sed ili ĉe ni ankoraŭ ne atingis tiun regulecon kaj tradicion kiel en eksterlando.

La dana instruisto L. Friis en Aabyhoj aranĝas jam dum 10 jaroj regule dum la somero unu aŭ du ferisemajnojn en Helsingör kaj unu aŭtunan semajnon en la sporta lernejo de Vejle. La someran aranĝon partoprenis ĉi-jare proks. 250 personoj. En Vejle estis 50 kun la partoprenantoj de la finfesto.

Kion oni faras? Feriojn! Feriojn ĝui! Belaj ĉambretoj puraj, riĉa matenmanĝo, antaŭtagmeze kursa laboro aŭ laŭplaĉe preparoladoj, promenoj tagmanĝo dimanĉa, post ripozo kafo kaj posttagmeze ekskursoj tra la belega arbaro, al la fjordbordo, per aŭtobuso en la ĉirkaŭon, post vespermanĝo kaj post kafo prelegoj, lumbildprezentoj, festetoj, kaj por tiuj, kiuj emas eluzi ĉiujn 24 horojn disponeblajn, la nokta klubo estas la ponto al la krepuskanta mateno. Tamen, neniu perfortiĝas, ĉiu partoprenas laŭ propra plaĉo.

Kiu ĉeestis? Diverslandanoj, maljunuloj, junuloj, diversprofesianoj, geedzoj, gefraŭloj, nur gegajuloj.

Ĉu oni lernas, studas, kursojn partoprenas? Laŭplaĉe: komencanta kurso, perfektiga kurso, prelegoj pri Esperanto-temoj, pri ĝenerale interesaj temoj sciencaj aŭ praktikaj, kun la celo de pripensigo pri la vivmaniero. Kaj oni povas renkonti geamikojn personajn aŭ oni povas en trankvilo preparoli aferojn de nia movado.

Kongresoj ne havas tiun intiman harmonion sed ĉe la ferikursoj oni

povas kuniĝi la diversajn dezirojn de ripozo, renkontiĝo kaj kleriĝado.

Mi konkludas, ke ni esperantistoj utiligu nian ferian tempon por viziti tiajn aranĝojn, ĉar ili prezentas la vere ferian atmosferon kaj ni samtempe sentas la fakton de internacia samideaneco. Kion oni ne povas dum kongresoj kaj kunvenoj solvi aŭ atingi, ĉi tie la ŝancoj estas pli taŭgaj.

Aŭ niaj grupoj aŭ ligoj aŭ entreprenemaj samideanoj aranĝu en Germanio ion similan (kun eksterlanda partopreno!) aŭ ni vojaĝu al tiuj internaciaj ferikursoj eksterlanden! Ĝi valoras la penon!

**Esperanto-Bücher in öffentlichen Bibliotheken ... im Ausland!**

Der „Openbare Leeszaal en Bibliotheek Enschede“ hat einen „Catalogus Esperanto Literatur“ herausgegeben, der ein Verzeichnis von etwa 180 Büchern in Esperanto enthält, die den Benutzern der Bibliothek zur Verfügung stehen. Während des Krieges wurde die vorhandene Esperanto-Sammlung vernichtet. Die jetzige Sammlung wurde nach dem Kriege durch Spenden und Anschaffungen neu aufgebaut.

**... in München**

Auf persönliche Anregung eines Samideano haben vier große Bibliotheken das Buch von W. Th. Oeste „Esperanto, Mittler der Weltliteratur“ angekauft, nämlich die Bibliothek des Deutschen Museums, der Hochschule für politische Wissenschaften, die Süddeutsche Lehrerbibliothek und die Münchener Stadtbibliothek. Das Amerika-Haus nahm das Buch als Spende gern entgegen, die Universitätsbibliothek und die Bayerische Staatsbibliothek (die außerdem die Esperanto-Post und Esperantologio abonniert) erhielten dieses Werk als Pflichtexemplar des Verlages. Die Bibliothek des Gewerkschaftshauses in München hat schon zum zweitenmal Esperanto-Bücher erworben.

## Deutscher Esperanto-Kongreß 1953

Der Oberbürgermeister der Stadt Frankfurt/Main, Herr Dr. h. c. Walter Kolb, hat in seinem Schreiben vom 22. November 1952 an den Präsidenten des DEB sein Einverständnis gegeben, die Schirmherrschaft über den Deutschen Esperanto-Kongreß an Pfingsten in Frankfurt am Main zu übernehmen und die Unterstützung der städtischen Stellen und sonstigen Einrichtungen bei der Vorbereitung und Durchführung der Veranstaltung zugesichert. Für die Tagung sind die Aula und die Hörsäle der Universität vorgemerkt. Ein Empfang des erweiterten Vorstandes und der Mitglieder des vorbereitenden Komitees durch die Stadt ist vorgesehen.

Der DEB dankt auch an dieser Stelle dem Herrn Oberbürgermeister für seine tatkräftige Hilfe. La Ponto wird zu gegebener Zeit ein Bild dieses Förderers unserer guten Sache veröffentlichen.

**Resumo:** La ĉefurbestro de Frankfurt, kie okazos la Germana Esperanto-Kongreso Pentekoston 1953, transprenis la Patronecon por tiu aranĝo kaj certigis la subtenon de ĉiuj urbaj instancoj. La universitato estos je dispono.

## Esperanto bei der Polizei

Der Hessische Minister  
des Innern

Abl. III Off. Sicherheit  
Aktenzeichen 7 s 02

Wiesbaden, den 15. 10. 52

Betr.: Fremdsprachen, hier:  
Esperanto bei der Polizei

Ich bin damit einverstanden, daß Esperanto bei der Polizei des Landes Hessen als Fremdsprache anerkannt wird.

Die Fremdsprachenkundigen uniformierten Polizeibeamten tragen zur Kennzeichnung 10 cm über dem linken unteren Ärmelrand einen grünen Ärmelstreifen, der in gelber Aufschrift die Fremdsprache bezeichnet.

Zum Tragen des grünen Ärmelstreifens sind nur Polizeibeamte berechtigt, die die bezeichnete Fremdsprache fließend beherrschen.

Mein Erlaß vom 18. 7. 52 III/ia — Az: 7 s 12 — betreffend die Kennzeichnung der uniformierten Polizeibeamten, die Fremdsprachen sprechen, ist im Staatsanzeiger für das Land Hessen, Seite 602, veröffentlicht. I. A. gez. Keil

**Resumo:** Heslanda Ministro por internaj aferoj:

Mi konsentas, ke Esperanto estas agnoskata kiel fremdlingvo ĉe la polico de Heslando. La oficejoj sciopovaj fremdan lingvon portas sur la maldekstra brako verdan rubandon kun flava surskribo de la koncerna fremdlingvo.

## 38. Esperanto-Weltkongreß in Zagreb

Der Präsident der Kroatischen Volksrepublik, Dr. Vladimír Bakarić, hat den Ehrenvorsitz über den Weltkongreß in Zagreb übernommen, der in der dortigen Universität vom 25. Juli bis 1. August 1953 stattfindet. Dr. Bakarić, der die Sprachschwierigkeiten von seiner Tätigkeit als UN-Delegierter Jugoslawiens aus der Praxis kennt und selbst in seiner Jugend sich mit Esperanto beschäftigt hat, versprach seine volle Unterstützung.

Der Bürgermeister der Stadt Zagreb, Herr Većeslav Holjevac, wird für die wirksamste Unterstützung des Kongresses sorgen. Er hat zwei Delegierte bestimmt, die an den Sitzungen des vorbereitenden Komitees teilnehmen und die Lösung der auftretenden organisatorischen Probleme sofort übernehmen werden.

**Resumo:** La prezidanto de la Kratia Popolrespubliko akceptis esti honora prezidanto de la 38 a UK en Zagreb. Kiel iama UN-delegito por Jugoslavio li persone spertis la lingvajn malfacilaĵojn kaj esprimis sian simpatian por Esperanto, kies gramatikon li kiel gimnaziano mem trastudis.

La urbestro de Zagreb promesis efikan kunlaboron kun LKK. Li delegis du reprezentantojn, kiuj partoprenu la laboron de LKK kaj transprenu ĝiajn organizajn problemojn por solvo flanke de la komunumo.

**GEA GRATULAS**

al ges-roj **Grenjo kaj Willi Brandenburg** en Münster/Westf. pro naskiĝo de sana forta fileto „Güdo“, irato por la dujara Ulĉjo.

**GEA FUNEBRAS**

pro la morto de **Alfred Gahler**, iam en Reichenberg, **Ottmar Sutor**, Augsburg, kaj **Hans Roppert**, Dresden.

**KOTIZPAGO POR 1953**

Ĉar la jarfino alproksimiĝas, ni atentigas pri la pago de la kotizoj por 1953. Ili estas, kvankam la ekonomiaj cirkonstancoj videble ŝanĝiĝis, ankoraŭ la samaj kiel 1948: 6.— gm po-jare, 50 Pfenigoj pomonate. Ni petas ĉiujn membrojn, kiuj troviĝas en sufiĉe bona stato, libervole plialtigi la sumon aŭ helpi per donacoj. Al tiuj, kiuj ne pagis ĝis fino de januaro (almenaŭ parton de la kotizoj), ni bedaŭrinde ne povas liveri „La Ponto“ ekde februaro.

La poŝtekkonto de GEA estas München 126 65.

Leo Jolliet, asocia kasisto.

**EL LA LIGOJ**

Berlina Informilo 52/9, 10 kaj 11 raportas pri la aktiveco kaj klopodoj en la regiono de la **Berlina ligo**, i.a. pri la esp-lingva prospekto por la urbo Berlino. Monataj kunvenoj de la ligomembroj. Ekskursoj al la botanika ĝardeno, al Tiergarten, al Jungfernheide. Regulaj kunvenoj de la instruistoj. Landa ligo de la Germana Esperanto-Junularo fondiĝis.

Verda Stelo 52/11 prezentas bonan varb- kaj diskutmaterialon de d-ro Herrmann kaj instigon al sukcesanca letervespero de R. Reuchlin. La **sud-okcidenta ligo** decidis en la kunsido en Berghausen: en aprilo 1953 konferenco en Neustadt/Haardt, en aŭtuno 1953 konferenco en Wilferdingen, kvaronjaraj renkontiĝoj (decembro Karlsruhe, marto Königsbach, julio Bretten).

**EL LA SEKCIOJ**

**Budhana sekcio** dissendis „La Budhanan Lumon“ n-ro 33 kun raporto pri starigo de okcidenta budhana ordeno. Rudolf Petri, esp-isto konata en okcidenta Germanio, estis konsekrata kiel pastro.

**ISAE-sekcio.** La celoj de ISAE (intern. scienca asocio esp.) estas: 1-e organizi esp. sciencistojn kaj helpi ilian interŝanĝon de pensoj ktp.; 2-e interesi sciencistojn pri E; 3-e eldoni Scienca Revuon; 4-e eldoni sciencajn fakajn vortarojn.

La ISAE-sekcio en Germanio fondis du laborrondojn. Unu okupiĝas pri la verkado de fakaj artikoloj originalaj kaj de resumoj el fakgazetoj (por publikigado en „Esperanto-Kurier“), la dua pri fakterminaroj.

Jam prepariĝis konsiderinda verko, la Scienco-Teknika Terminaro (STT). Ĝi enhavas tiujn terminojn, kiuj ne estas troveblaj en Plena Vortaro de SAT, kaj ampleksas preskaŭ ĉiujn terminojn, kiujn enhavas la fakaj E-vortaroj ĝis nun aperintaj sed ne plu haveblaj. La difinoj estas donitaj esperantlingve kiel en PV.

La membroj pagu la kotizon por 1953 ĝustatempe al dipl. ing. R. Hafer, korn, Regensburg, Luitpoldstraße 5.

**Gepatra sekcio.** Murkalendaro 6paĝa ilustrita eldoniĝas por la membroj. Kelkaj ekzempleroj estas je dispono ankaŭ al nemembroj.

**EŬROPO KAJ ESPERANTO**

Estas antaŭvideble, ke dum 1953 okazos la unua balotado por Eŭropa Parlamento. La Paneŭropa Sekcio de GEA volas true kaj verve partopreni la propagandon. Necesas aktivaj helpantoj! **Kiu pretas kunlabori?** Bonvole kontaktu kun d-ro Holtmann, (21a) **Beckum/Westf.**, Hühlstraße 10.

**Varbparoladoj**

Franz Schneider, (21b) Niedermarsberg, Hauptstraße 33, pretas prelegi precipe en popolaĵtermejoj.

Die beiliegende Zahlkarte soll Ihnen erleichtern, Ihren Beitrag zur Teilnahme am Deutschen Esperanto-Kongress, Pfingsten 1953 in Frankfurt einzuzahlen. Sie erleichtern dadurch die Vorbereitungsarbeiten, Beiträge:

Kinder bis 14 Jahre . . . . .	frei
Jugendliche 14-21 Jahre . . . . .	3.— DM
Erwachsene . . . . .	5.— DM
Ehepaare . . . . .	2.— DM

**GRUPA KAJ INDIVIDUA LABOROJ**

**Arnberg:** Schneider, Niedermarsberg, parolis en la gimnazio (20 p.). Grupfondo. — **Auloh (ĉe Landshut):** kurso. — **Berghausen:** kurso ĉe naturamika junularo (20 p.). —

**Berlin:** Prezento de la dana varbfilmo. Diskutvespero en la angla „Brücke“ kun reaŭdigo de la radi-sonrubando (NWDR, Der Hörer hat das Wort). Dahlmann parolis en la sindikato DGB pri „Die europäische Einigung — ein Sprachenproblem“. Gieseler parolis pri „Ĉu ni perdadu la fruktojn de nia laboro?“ — Sveda instruistino vizitis Berlinon por studi la lernejsistemon ĉi-lokan. Ŝi estis kelkfoje gasto de la E-grupoj. — 2 kursoj en la popolaltnerejo Kreuzberg, 1 en Lichterfelde, kurso por artistoj en Schöneberg. — Nova junulgrupo okcidenta kun kurso. —

La honora membro de Waidmannslust, Ir-ino **Johanna Doering** festis la 86an naskiĝtagrevenon. Ŝi donacis sian kompletan E-bibliotekon al la grupo. —

**Bremen:** multaj Breĉmenanoj vizitis eksterlandajn kunvenojn kaj reciproke multaj eksterlandaj s-anoj estis gastoj en Bremen. La grupo havas speciale amikan kontakton kun la klubo en Karlskogo, Svedio. 4 membroj vizitis la germanan klubon kaj 4 junaj gebremenanoj vojaĝis Karlskogon. Per tio estiĝis multaj raportoj kaj diskutoj en la grupo kaj la kluba vivo riĉiĝis. — „Bremer Nachrichten“ aperigis jam centfoje Esperanto-angulon. — 2 kursoj en la popolaltnerejo kaj 1 ĉe Kristana Asocio de junaj viroj (CVJM).

**Büsum:** 3 kursoj. — **Essen:** d-ro Wegener parolis pri la E-kultur-domo en Grésillon, Francio. — 1 kurso por komencantoj, 1 ĉe la Kolping-junularo. —

**Frankfurt/Main:** kongrespreparaj laboroj. Vizito de eksterlandaj s-anoj. — „Neue Presse“ raportis pri la grupa laboro kaj skribis i.a.: „Ziel ist, Frankfurt wieder zu einer Esperanto-Hochburg zu machen, wie es einer internationalen Welt- und Handels-

stadt durchaus ansteht.“ — 2 kursoj. — En la monata informilo kanttekstoj. —

**Göttingen:** prezentado de la filmo „Danlando“. La grupa biblioteko estas nun en la kadro de la urba biblioteko je dispono al la granda publika. — La grupvesperoj ĝenerale havas tri partojn: prelego, diskuto pri temo de ĝenerala intereso (ĉu nova armo?, ĉu mortpuno?, ĉu literaturo?). — **Hamburg:** kurso por komencantoj. — **Lampertsheim:** kurso (10 p.). — **Lippstadt:** kurso en popolaltnerejo. — **Lingen:** gazet-propagando, kursoj en la kadro de „Arbeit und Leben“ kaj en la popolaltnerejo. Popolaltnerejanoj lernas E-on. — **Mainz:** varbado por la Frankfurta kongreso. — **Mülheim/Ruhr:** kurso en la popolaltnerejo. —

**München:** kursoj ĉe la sindikato por komenc. (12 p.), en la teknika altnerejo kaj en la universitato, en la E-Centro Pasing, por progresintoj en la universitato kaj en la Ricmer-schmid-lernejo. En la Sindikata Domo okazis ekzamenoj por kapableco, kursgvidantoj kaj instruistoj. 16 gekandidatoj ŝvitis sabate la 22an kaj dimanĉe la 23an de novembro dum entute 7 horoj! Malgraŭ la seriozeco estis tre amuzaj la interpretistaj ekzercoj, kiam la gekandidatoj devis helpi al eksterlanda gasto (fikcia) ĉe vizito al bierfarejo, al la Oktobra Festo, ĉe aĉetado de memorajoj, bildkartoj, ktp. eĉ ĉe ŝuisto aŭ tajloro! Pri la korektado nun ŝvitas la ekzamenkomisiono, la disdonon de la atestoj dum la Zamenhofa Festo (la 21an de decembro) atendas la gekandidatoj. — **Oberkirch/Baden:** W. Poppeck gvidas kurson kun 20 partoprenantoj en la popolaltnerejo. — **Troisdorf:** kurso. — **Tuttlingen:** d-ro Paŭl gvidas kurson en la popolaltnerejo (8 p.). — **Ulm:** ekspozicio en lernejo. — **Wattenscheid:** prelego de T. Megalli ĉe la popolaltnerejo. — **Wiesbaden:** dum septembro aperis 7 sciigoj pri Esperanto en gazetoj de Wiesbaden. La urba trafikoficejo ree pagis anoncon tutaĝan en la UEA-jarlibro.

## La Eta Almozulo

**Kristnaska fabelo de Maŭro Jokai; el la hungara lingvo tradukis T. Czitrom.**

La patro falis en la maron kaj dronis... La patrino estis lavistino: en nokta laboro malvarmumis, ricevis egan febron kaj mortis... Restis sola la eta knabo kaj ankoraŭ li estis apenaŭ kvarjara.

Kiam oni portis la patrinon al la tombejo, la eta knabo pensadis: kaj nun, kiu diros al mi „kara knabeto“, kiu donos al mi panon matene, vespere? Kiu estonte pretigos mian liton, kiu donos al mi puran veston, se mi malpurigis? Kiu prenos min sur genuojn kaj kisados min, se io doloras al mi?

La najbaroj transloĝiĝis, fremduloj venis anstataŭ ili. La infancto volis eniri al ili, sed ili demandis: „Kion vi volas? Kion vi serĉas tie ĉi? Iru for!”

Kaj foritis la eta malfeliĉulo, iris al la strato, kie li konis neniun, ekhaltis ĉe stratangulo kaj rigardis la preterirantajn homojn: ĉu ne similas iu al lia patro, por ke li alparolu lin. — Vane li rigardis. La homoj havis aliajn zorgojn ol atenti la strate starantajn knabojn. Se iu en la nova mondo volas ricevi ion, tiu devas paroli. Vera almozulo bone konas sian profesion: li kuras post la elegantaj sinjoroj, al ili frotas sin kun siaj malpuraj vestoj kaj tuŝ, por liberiĝi de li, ĵetas al li moneron. Tiu almozulo, kiu nur ploras, devas malsatmorti.

La eta knabo estus malsatmortinta jam la unuajn tagojn, se iu bona maljuna fruktovendistino ne estus vendinta ĉe la stratangulo, kie li estis. Ŝi nur rigardis la etan knabon, kiel longe li staradis tie. Eble li volas ŝteli. Kiam ŝi vidis, ke ĝis vespere li staras tie, ŝi ekkompatis lin, donis al li malbonan pomon kaj diris: „jen, knabeto, sed nun iru hejmen!”

La eta knabo estis kutimita al oboe, kaj li ekiris hejmen. Jam estis vespero kaj en la granda urbo ĉiu pordo estis fermita. La eta orfo silente ploradis kiam li pensis, ke li povas nenien hejmeniri; lin neniu atendas, por li nenie oni pretigis liton...

Poste li kuntiris sin en la angulo de iu pordego kaj tie plorante ekdormis. En sonĝo li ĉirkaŭpremis la grandan ŝtonon, kiu ŝirmis lin kontraŭ la vento kaj diris al ĝi: „Kara patrino!” Ofte li vekiĝis kiam la vento blovis, kaj veante li turnis sin sur sian alian flankon; tre malmola estis la lito.

La alian tagon li denove serĉis la bonan vendistinojn, kiu, vidante ke la infancto estas tiel malgaja, denove donis al li manĝestaĵon.

La trian tagon, la kvaran tagon, denove li trovis la bonan maljunulinon, sed la kvinan tagon vane li atendis ŝin ĉe la stratangulo. Multaj homoj iris, venis sur la strato, eĉ pli multe ol en aliaj tagoj, nur la maljunulino ne venis.

La eta orfo fine demandis iun unupiedan almozulon (pli grandan sinjoron li ne kuraĝis, demandi): „Kie estas la bona vendistino?” — „Hodiaŭ ŝi ne venos tien ĉi”, respondis la almozulo, ĉar hodiaŭ estas festotago.” — „Sed kial estas hodiaŭ festotago?” — „Ĉar hodiaŭ naskiĝis Jesuo. Ĉu vi ne vidas, ke oni iras al la preĝejo?”

Kien oni iras tiom multope, eble por li ankaŭ estas permesate eniri, pensis la orfeto kaj ĝojegis, kiam li vidis el tiu granda domo — pli belan neniun havas — oni ne forpelas lin, oni ne demandis lin „kion vi volas tie ĉi?” sed oni lasis lin ĝui la multajn belajn kantojn kaj esti inter la elegantaj sinjoroj.

Iu estiminda sinjoro poste multe parolis al la homoj. Li rakontis, kiel naskiĝis la eta Jesuo en trogo inter paŝtistoj kaj kiel li vivis malriĉe, mizere, kaj kiel li amis ĉiam la infanojn. Tre volonte li estus aŭskultinta longe tiun estimindan sinjoron.

Ĝis la vespero li trovis multajn preĝejojn malfermitajn; sed vespere oni fermis ilin kaj li restis denove sur la strato. Multaj fenestroj estis lumigitaj, sur la strato veturiloj kuradis tien kaj reen. Tra brilantaj fenestroj li vidis abiojn kun brulantaj kandeloj, suker-anĝelojn kaj malgrandajn lulilojn, en kiuj kuŝis la eta Jesuo. La orfeto rigardis ilin longe. Tre bela estas la naskiĝo-tago de Jesuo!

Nur tiel malvarme ne devus esti en tiu tago... Estas bone al tiuj, kiuj povas apud varma forno sur la sino de sia patrino aŭskulti la sibladon de la vento. Sed por tiu, kiu ne scias kien hejmeniri en tiu malvarmega vetero...! Denove li reiris al la preĝeja pordo, tie surgenuis kunmetante sianjn manetojn: „Kara Jesueto, vi tiel ŝatas la infanojn; se vi bezonas malgrandan serviston kia mi estas, prenu min al vi!” — Kaj la Savinto ekaŭdis la peton de sia eta servisto kaj prenis lin, kiun neniu volis akcepti sur la tero. Tie ekdormis la eta knabo kaj vekigis — en la ĉielo.

(Laŭ „La Folio”, Malmö dec. 1950)

## Kandelfesto

Brulantaj vaskandeloj ĉiam ĉieloke nin impresas. Ili kreas ian certan atmosferon aŭ de soleneco kaj seriozeco aŭ de gajeco kaj ĝojo.

Estas strange, ke la sama brilo de kandeloj povas disvastiĝi en granda katedralo edifan, mistikan animstaton, kaj varmigian, esperplenan humoron en la plej mizera kabaneto.

Brulantaj kandeloj akompanas nin dum nia tuta vivo: la blanka vaskandelo estas la simbolo por la pureco de la infanaĝo kaj la funebra signo por la mortintoj. Kandeloj brulas same hele kaj sentuŝite apud la ĉerko de amataj homoj kiel sur la festo-tablo dum la plej gaja kaj vivoplena bankedo. Sed tamen tiu tremanta brilo de mola vakso havas grandan efikon. Ekbruligu kandelojn kaj vi trovos, ke la homoj mutiĝos, kvietiĝos kaj paciĝos. Precipe en nia tro rapida maltrankvila epoko ni ree ŝatas la kandelojn, ĉar ili invitas nin en sia brilo al meditado kaj restado. Kio estus nia Kristnasko-festo sen kandeloj! Ili ja donas al la festo la magian ĉarmon, sen kiu ni ne povus imagi ĝin. La plej malgranda neĝkovrita arbo fariĝas juvelportanta en la lumo de kandeloj. Jam en la antaŭkristnaskaj semajnoj ni ekbrulas unu kandelon post la alia sur la abikorono preparante nin por la miloj da kandeloj, kiuj eklumos dum la „Paca nokt”, „Sankta nokt”. La lumo de la flagre kraketantaj kandeloj sur la abieto respregulas la tutan sorĉon de la festo kun la grandaj ĝojigataj infanokuloj. En tiu tremanta, nekonstanta kaj ofte mallonga, sed nepre alloga kandellumo ni eble senkonscie sentas ian parencecon kun nia vivo. Pro tio ĝi ankaŭ haltigas kaj enpensis nin almenaŭ unufoje dum la jaro. Ĉu nia Esperanta popolo ne ankaŭ bezonas tiun kreaĵon paŭzon kaj enprofundiĝon en la milda brilo de kandeloj el ĉiuj partoj de la mondo?

Pro tio mi ankaŭ tuj entuziasmiĝis je la propono de s-ano Heath en Ipswich, aranĝi internacian kandelfeston. Okaze de la venonta Zamenhoftago li festos kun siaj gelnantoj kaj la gepatroj en la kandelbrilo el 27 landoj „Esperanto-Kandelfeston”. Mia lernejo ankaŭ jam ricevis kandeleton kaj reciproke sendis ruĝan kaj blankan kandelojn el Bavarujo al Anglujo. Kiuj el vi, karaj legantoj, volas same aĝi kaj pripensi en kandela lumo de multaj nacioj kun nia granda Esperanto-familio nian komunan pacan agadon kaj altan celon? L-ino

### Historio de flagetoj

Niaj verdaj Esperanto-flagoj kun la kvinpinta stelo estas por ni ne nur simbolo kaj unuiga signo, ili ankaŭ havas sian historion, kaj vidiĝas la interligiteco de la homoj agantaj sub ili. Ni memoras pri la solena transdono de flageto pere de s-ino Isbrücker, Arnhem, okaze de la kongreso en Getingen 1949. La flago estis trovinta sekuran hejmon en Nederlando dum la milit- kaj persekuttempoj kaj nun ree ĝi estas en la hejma grupo de Kolonjo.

En julio 1936 okazis la fermkunveno de la Kolonja grupo. Oni sciigis, ke la grupo ne plu rajtas ekzisti. Oni disdonis la havaĵon de la societo. Estis ankoraŭ kvar flagetoj verdaj. Kien ilin doni? Kiu ilin prenos, savos? Ĉeestanta juna dana samideano helpis. Li transprenis ilin. Unu li donis al la Esperanto-domo en Arnhem, de kie ĝi retrovis la vojon al Kolonjo 1949, alia restis ĉe belga grupo, la tria ĉe dana societo kaj la kvaran li mem hejmenprenis kaj ĝin flirtigis ĉe Esperantofestoj kaj -kunvenoj.

Ĉe la internacia feria kurso en Vejle, oktobron 1952, li konatiĝis kun germana samideano. Dum la finfesto li solene redonis la flagon al Germana Esperanto-Asocio, kore salutante la partoprenintojn de la tiama kunveno en Kolonjo. Nia estrarano Moravec danke kun kortuŝaj vortoj transprenis la flagon kaj rimarkigis, ke tiu okazaĵo — ŝajne sensignifa — tamen pravas, ke nia lingvo interligas homojn malgraŭ barantaj limoj kaj malpermesoj ŝtataj. La agado de la instruisto E. Langkilde Rasmussen, (Hionum pr. Rask Mølle, Danio) estas modelo kaj ĝi instigas nin daŭrigi niajn klopodojn por la internacia interkompreniĝado kaj kunlaboro. Germana Esperanto-Asocio dankas pro tiu pruvo de translima kamaradeco kaj resalutas la amikojn eksterlandajn.

mor

### KONGRESO EN NOV-ZELANDO

La 18a Kongreso de Esperanto en Nov-Zelando okazos de 29-12-52 ĝis 2-1-53 en Auckland, urbo en la nordo de la norda insulo nov-zelanda. El la programo estas menciinda la plano de LKK kolekti la programerojn por koncerto laŭ ofertoj de kongresanoj, kiuj mem pretas kontribui per muzika prezento dum la kongreso. Ni ege scivolvas pri la rezulto de tiu eksperimento.

### LA NOVA MONDO KAJ ESPERANTO

En Brazilio grupo reprezentanta la plej gravajn instancojn de tiu lando sendis alvokon al la Organizaĵo de la Amerikaj Ŝtatoj, proponante la enkondukon de Esperanto kiel oficialan lingvon en la konferencoj kaj aliaj kunvenoj — sociaj, sciencaj aŭ politikaj — kun interamerika karaktero. La alvoko havas la formon de publika letero, eldonita en bele presita libreto, en la Portugala kaj Esperanta lingvoj, kun subskriboj de brazilaj eminentuloj. Ĝi estas eldonita de la Brazilia Instituto de Geografio kaj Statistiko.

(Int. Gazet. Servo)

### POŝTMARK-KOLEKTANTOJ ATENTU!

Unu el la tri grandaj filatelaj revuoj de Svedio, **Frimärks-Bladet**, decidis kunlabori kun IAPK (Intern. Asocio de Poŝtmarkkolektantoj). Ek de decembro 1952 ĝi enkondukos regulan esperantlingvan paĝon kun filatelaj informoj, kaj E-kurso por filatelistoj. Vi ĉiuj rajtas per Esperanto tute senkoste anonci pri poŝtmark-interŝanĝo. Partoprenu multnombre kaj montru al la filatela mondo la utilon de Esperanto. Adreso: Ingemar **Nordin**, Skolvägen, Aarjäng, Svedio.

### AŬSKULTU AL RADIO ROMA

Dum decembro 53 la eksterlanda servo de Radio Roma invitas al granda konkurso kun premioj. Dum la dissendoj oni priskribos italajn produktaĵojn, kies nomojn vi komuniku poŝtkarte al Radio Roma, „Concorso Premi”, Via Veneto 56, Roma. Mallongaj ondoj: 25,21 m, 31,35 m, 49,22 m, merkrede kaj vendrede horo 19.00—19.20a.



# Viva sen libroj!

Multaj samideanoj diras — eble ili ne diras tion laŭte kaj tion nur pensas, ĉiukaze ili agas tiel — „mi povas vivi sen libroj!“

Kompreneble, tion oni povas. Al la soldatoj ekzemple dum longa tempo sufiĉas kulero kaj manĝujo, kaj tio ankaŭ sufiĉis al multaj aliaj. Tamen ni ĉiuj, reveninte hejmen, kun ĝojo uzis telerojn, tasojn kaj manĝilaron. Kial ni ĝojis, kvankam ankaŭ sufiĉis kulero? Ĉar gustas pli bone per telero kaj manĝilaro, kaj ĉar per tiuj objektoj nia vivo fariĝas iom pli bela.

Tial ni ĉiuj penas ne nur pergajni sufiĉon, sed iom pli. Ni ja ne volas nur vivi, ni ankaŭ postulas ion de la vivo. La enspezoj estu pli altaj ol la elspezoj.

Sendube tio estas memkomprenebla, sed oni ofte ne priatentas ĝin. Ĉe la libroj tiun kompreneblajn tiuj ne vidas, kiuj opinias, ke ili povas vivi sen libroj. Ili ne atentis, ke vivo sen libroj estas same kiel manĝo sen ilaro.

Do, ĉiu povas aĉeti librojn, eĉ se li vivas plej modeste. Ekzistas multaj libroj, kiuj ne kostas pli ol unu tagmanĝo, eĉ iom malpli. Dum oni satiĝas nur unu fojon de unu tagmanĝo, oni povas „nutri“ sin dum tuta vivo de bonaj libroj; multaj eĉ povas kunnutri sin.

Libroj ankoraŭ havas aliajn belegajn ecojn. Ekzemple, multo kion vi aĉetas, eluziĝas kaj malnoviĝas, fariĝas senvalora. Dume libroj daŭras jarcentojn, eĉ jarmilojn, kaj ju pli malnovaj ili fariĝas, des pli valoraj ili estas. Mi konas librojn, kiuj antaŭe kostis nur kelkajn monerojn; hodiaŭ oni donas por ili altajn sumojn.

Ne ĉiuj libroj, kompreneble, sed nur certaj, bonaj. — Kion signifas „bona“? Tion oni devus scii. Ĉiu ajn aĉeto postulas antaŭan informon. Alie oni ne povas diferencii inter valora kaj nevalora. Feliĉe, oni povas informi sin. Se temas pri bonaj libroj, bonvole turnu vin al bona Esperanta libroservo.

Certe vi volas doni al iu belan kaj bonan donacon. Jam nun serĉu kaj mendu valorajn librojn ĉe Ziegler-eldonejo, München-Pasing, Engelbertstraße 7, aŭ ĉe SAT-peranto Leonhard Puff, Frankfurt/Main, Heerstraße 85.

## JAPANA SCIENCISTO

verkis disertacion en Esperanto pri sia bunsukcesinta eksperimento ĉe silkraŭpoj. En la nacia Silkraŭpkultura Esplorinstituto de Maebasi-si s-ro Haruo **Hasimoto** submetis in-kri-zalidojn de certa silkraŭpa speco nome „Zebra“ (pro nigraj strioj ĉirkaŭ la korpo) al Rentgenaj radioj (X-radioj). La rezulto estis **sekslimita Zebra**, do: post hibridigo kun normala aŭ „travidobla“ raŭpo ĉiuj ĝiaj inaj idoj estis Zebra-tipaj. Tio obligas facilan ekonomon de la inseksaj raŭpoj, kaj ĉiu silkraŭp-kulturisto scias la grandan signifon de tiu ebleco. — La disertacio aperis esperanlingve kiel aldono al la dulingva revuo „Revue du Ver an Soie“ — „Journal of Silkworm“ en Francio, 4 paĝa (A4) kun resumoj en angla kaj franca lingvoj.

Aliĝu al la 38a Kongreso en Zagreb! Gis 31-12-52 validas la malalta kotizo: plenkreskuloj 21.— gm, edz(in)o la duonon, junulo la trionon, membroj de UEA 3.— gm malpli. Peranto: GEA, pĉk. München 126 65.

## SEN KOMENTARIO

La Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovakio informas nin „kun sincera bedaŭro, ke ĝi likvidiĝis... Ni petas vin, ne plu adresi iajn poŝtaĵojn al nia oficejo en Praha. Se laŭ via opinio konvenas ke la ĉeĥoslovakaj esperantistoj restu informitaj pri la Esperanto-movado, bonvole sendadu vian organon kaj viajn eldonaĵojn al s-ro Jaroslav Šustr, Dlouha 10, Praha I. Por tiu subteno akceptu nian antaŭan dankon“.

## Kleinanzeigen

Kelkaj ekzempleroj de la **kalendario 1953** (6-paĝa, ilustrita, 32 × 48 cm) de la gepatra sekcio estas ankoraŭ je dispono. Havebla kontraŭ donaco de 5.— gm. aŭ pli al poŝt-ĉeka konto Hamburg 683 19 (F. Moravec).

Senŝtata **Sendependa Organo Liberecana** aperos ek de januaro 1953 presita. Enhavo: Aktuala — Instrua — Kultura. Provkompletoj senpage akireblaj ĉe **Ad Smit, Nieuwe Herengracht 35, Amsterdam-C, Ned.**

Salutkartoj por Kristfesto kaj Novjaro, diversmotivaj, estas tuj livereblaj. 2 kostas 35 pf., 10 kostas 1.50 gm. Mendu ĉe Ziegler-Verlag, München-Pasing

## NIAJ GRUPOJ KAJ LIGOJ RAPORTAS

**Berlin:** 12—17jaraj knaboj serĉas korespondadon kun esterlandaj gekamaradoj; adr.: Berlin-Wittenau, Eisenpfehlstraße 55. — **Bremen** aranĝas interesan vintran programon kun lingvaj ekzercoj, diskutoj diverstemaj, lud- kaj kantvesperoj; ekzistas speciala E-rondo de Kristana Asocio de Junaj Viroj (CVJM) pritraktanta dum siaj vesperoj bibliajn temojn. — En **Düsseldorf/Köln** kunlabore kun Revolo la starigo de „landa unio NRW de GEJ” estas preparata. — **Freiburg:** Reg. Ligo Baden donis transversion de sia laboro en 8-taga ekspozicio komune aranĝita de ĉiuj junularorganizoj en LJR Baden; la ekspozicio poste tramigros la badenajn urbojn. Sekve de tiu ekspozicio okazas nova kurso en Jugendbildungswerk Freiburg, kie E. kiel sola fremdlingvo estas ankoraŭ instruata, dum kursoj en angla kaj franca lingvoj ĉesigiĝis pro malintereso. Radio Südwestfunk en sia programo por la junularo disaŭdigis referaĵojn pri Esperanto en la eŭropaj instancoj responde al artikolo pri bilingvismo en „Jugend Europas” (septembra numero). — En Herford fine de septembro kongresis la junulargrupoj el Bielefeld, Bünde, Detmold, Herford kaj Osnabrück; la loka gazetaro raportis pri la konferenco, same pri la partopreno de Herforda knabino al la kongreso en Oslo. Komenciĝis nova kurso por gejunuloj kun 12 pp. Herforda gazeto ankaŭ raportis pri filmo de DJH (junul-gasteja movado: „Sommer, Sonne und Ferien” prezentanta bildojn de junulaj feriaj restadoj 1952, i. a. ankaŭ pri la tendaro de GEJ ĉe Walchensee. — Konstanz komencis novan kurson en Jugendbildungswerk. — München raportis pri komenco de ampleksa vintra programo, i. a. kun raportoj pri itala vojaĝo kun Michel S., pri UEA-kongreso, nova kurso. — Ravensburg: Sinjo Schmalzriedl invitiĝis de la akordeonorkestro/muziklernejo Gross por servi dum venontaj eksterlandaj vojaĝoj de tiu orkestro kiel interpretistino esp. GEJ gratulas tiun progreseman orkestron kaj petas siajn anojn sendi bondeziraĵojn al la estro de tiu muziklernejo (Olgastr. 4). — Rendsburg raportis pri varbvespero bone vizitata kun parolaĵoj, libroekspozicio, gazetara raporto. — En Schl.-Holstein fondiĝis 1. 11. 52 landa ligo de GEJ; prez.: W. Bormann.

### La estraro informas.

a) Kotizo 1952: ĉiuj grupoj kaj izoluloj ankoraŭ ne sendintaj la tutan kotizon por 1952, bv. fari tion nepre tuj, por ke ni povu sendi al ili la kotizmarkojn (pĉk. konto Karlsruhe 54577).

b) Kotizo 1953: ĉar la jarkunveno en Ratingen ne laŭstatute fiksas la kotizon por 1953, la estraro (kun posta aprobo en Frankfurt) fiksas ĝin je 50 gpf monate po membro. La eta altiĝo necesiĝis por ekvilibri la buĝeton estonte. Izoluloj pagu rekte al la kasistino, aliaj membroj perc de siaj grupoj. La grupoj rajtas reteni por si monate 10 gpf po membro, do devas sendi al GEJ 40 gpf. Kie ekzistas landa ligo de GEJ, ni rekomencas al ĝi 5 pfg (ĝis nun nur Schl.-Holstein; Baden rezignis favore al GEJ je sia kotizparto). Por 1953 vi ricevos 2 kotizmarkojn duonjarajn post pago de la konc. sumo. Kiel balotilo dum la jarkunveno en Frankfurt validas nur membrokartoj kun la kotizmarko por la 1-a duonjaro 1953. — Fine ni deziras al ĉiuj membroj kaj amikoj de GEJ benitan Kristnaskofeston kaj feliĉan Novan Jaron!

c) La redaktadon de niaj publicotaj artikoloj en **Esperanto-Post** kaj **Esperanto-Kurier** transprenis Werner Bormann, kies adreso ĝis fino de februaro estas Frankfurt/Main, M. Maystr. 19 (bei Krüger). Bonvole sendu al li viajn kontribuojn.

**Junulartendaro 1953 ne okazos** post la Germana Esperanto-Kongreso Pentekoston en Frankfurt, laŭ deziro de la grupoj. Ni planas internacian feriosemajnon apud Bodensee, probable dum aŭgusto.

**Modesta Bukedo**, Prozo kaj Poemoj de Karl Jost, 80s., 12 × 15 cm, broŝ., Zürich 1952. Prezo: 2,25 gm.

La prozaj legendoj kaj epizodoj estas agrabla legajo, kian oni verŝajne ne scrĉas en tia libreto. Speciale menciinda estas la paĝoj pri „Nia lingvo“ en kiu la aŭtoro prezentas siajn observojn pri la evoluo de Esperanto. La poemoj originalaj ne atingas la kvaliton de la tradukitaj, precipe de la kantoj. Ili grandparte jam aperis pli frue, ĉu de li mem, ĉu de alia tradukinto. Ekz. la „Societa Kanto“ (Es kann ja nicht immer so bleiben) aperis jam 1911 de li, poste de J. W. Schilde kaj antaŭe de L. E. Meier. Precipe ĉe „Lorelej“ mi miris trovi krom la tradukoj de Elb, Wink kaj Christaller ankoraŭ alian tradukon de Jost, aperinta 1925, kaj la nunan formon jam en libreto de 1911. Ĉu la aŭtoro poste mem preferis la pli frue verkitan formon? Mi konsentas pri tio, kvankam ĝi ne povas konkurenci kun la traduko de Christaller. — Ankaŭ „Vi kiel floro estas“ de Heine ekzistas jam en tradukoj de Butler kaj L. E. Meier, sed ĉe tiu poemo mi senhezite preferas tiun de Jost, dum ke mi ne volas decidi ĉe la „Rozo Erikeja“ inter la tradukoj de Sellin kaj Jost rilate la tutan verkon, sed „erikejo“ certe pliproksimiĝas al la originalo de Goethe ol „herbejo“. De Goethe ni ankoraŭ trovas alian konindan tekston tie: „La Dicco“ (Edel sei der Mensch...). Vere modela estas tiu traduko, kaj jam pro ĝi, sed ne sole, la libreto estas leginda.

**12-lingva Slosilo**, 7 × 20 cm, 96 p., broŝ., prezo 5,80 gm.

La eldoninto, Vilho Setälä en Helsinki kompilis grandan aron da utilaj frazoj kaj esprimoj, kiujn li kun helpo de s-anaĵ fakuloj en 10 landoj eldonis nun en lingvoj finna, sveda, angla, germana, franca, rusa, Esperanto, dana, norvega, itala, hispana kaj portugala. Lakumita kovrilo kvin-kolora firme ĉirkaŭas tiun gvidlibreton por turistoj, kiuj nuntempe sen malfacilaĵoj povas trapasi la regio-

nojn de ĉi ĉiuj lingvoj. Per unu manovo oni trovas sur la sama paĝo 25 esprimojn pri la koncerna fako, kies simbolo troviĝas je la margeno. Alfabeto indekso por ĉiu lingvo aparta ebligas la serĉon de certa vorto en ĉiuj aliaj lingvoj samtempe. Kompreneble ĝi ne anstataŭas ampleksajn vortarojn por la diversaj lingvoj, sed por la bezonoj de vojaĝanto ĝi absolute sufiĉas. Gratulon pro tiu nova eldonajo.

**Ŝlosiloj**. El la kolekto de la multnombraj diverslingvaj ŝlosiloj (konciza gramatiko kaj vortaro) reaparis la **hispana** kajero, fotokopie reeldonita jam la trian fojon en Urugvajo. Ĝi ampleksas 32 paĝojn 8 × 12,5 cm, pezas 15 gramojn kaj kostas 40 pfenigojn. Ni ankaŭ peras el Svislando sampreze la ŝlosilojn en germana, franca, itala kaj romanĉa lingvoj.

La Internacia Asocio „**Bellamy**“ jam delonge praktikas Esperanton por siaj celoj de „Ekonomia Egaleco“ kiel nomiĝas ĝia esperantlingva organo, aperanta en Nederlando. Nun eldoniĝis 20 paĝa broŝuro 14 × 21 cm sub la titolo „**Liberigo de Timo kaj Mizer**“, havebla kontraŭ 2 resp. kup. ĉe Intern. Asocio Bellamy, Koningstr. 188, **Beverwijk**, Nederlando. Ĝi ebligas detalan informiĝon pri la idearo de Bellamy en korekta, klara Esperanto sub la devizo: „La cirkonstancoj formas la homon, sed la **konscia** homo ŝanĝos la cirkonstancojn.“

**Jarlibro de UEA**, dua parto 1952.

70 paĝojn, 11 × 15 cm, liverata nur al individuaj membroj de UEA.

Ĝi enhavas la kotizinformon por 1953, koncizan raporton pri la progresoj de nia movado dum 1951 kaj la unuan parton de fervoja terminaro, konsistanta el tri sekcioj: „Antaŭesploroj necesaj antaŭ ol peti permeson konstrui fervojlinion“. — „Konstruado“ kaj „Pontado“. Ĉiu sekcio havas apartan terminaron kun multaj ilustraĵoj. Tiu fakverko certe estas tre interesa por ĉiu lingvisto kaj teknikisto, sed ĉu ĉiuj individuaj membroj satas tian legajon? Ritt

## PROSPEKTOJ

**Magneto Düsseldorf**, 22 paĝa varbprospekto kun stratmapo, kaj multaj kliŝoj. La bonan impreson de la moderna ekstero negative influas malplaĉaj vortoj, ekz. „korta preĝejo“, „pfalzgrafo“, „pezindustrio“, „vitala“, („necesa por vivi!) aŭ germanismaj tradukoj, ekz. „estas kvazaŭ transformiĝis...“, „la allogo estas en la moda sinteno de la strata vivo“. Ankaŭ la nombro de la preseraroj (mi trovis 15) estas iom alta. Nepre laŭdinda restas la favora sinteno de la eldoninta oficejo: Werbe- und Verkehrsamt Düsseldorf, Ehrenhof 3.

Varbfolion 1½ paĝan eldonis la germana **Konsum-Kooperativo „GEG“**, Hamburgo. Ĝi enhavas koncizan skizon pri la historio de la konsumkooperativoj en Germanio kaj kelkajn statistikajn ciferojn.

6paĝan bildprospekton pri la belga urbo **Antverpeno** eldonis la tiea oficejo „Propagando kaj Turismo“. 6 grandaj kaj belaj kliŝoj invitas ĉiun vojaĝeman Esperantiston al tiu vidinda havenurbo.

Samgranda, sambela prospekto nin atingis el la fiŝista loko **Volendam** en Nederlando. Nepre vidindaj estas la kostumoj tie portataj.

Por la 24a itala Esperanto-Kongreso la itala turisma kompanio CIT eldonis varbfolion kun bildoj pri **Bologna** kaj **Ravenna**, kien ekskursis la kongresanoj. Bedaŭrinde ĉiuj klarigoj estas en itala lingvo! Ĉu oni ne atendis eksterlandajn samideanojn?

Pri la svisa urbo **Thun** aperis 10paĝa faldfolio, duone teksto pri ĉiaj sciindaĵoj, duone belegaj bildoj de tiu pitoreska loko.

Tro klara preso, sed strange aspektas la uzo de kunligitaj vokaloj laŭ franca maniero, ekz.: arŝanĝo, pæmeca. Gratulon tamen al UEA-dcl. Fritz Schwarz, Wiesenstraße 1, **Thun-Bn.**, Svislando, kiu ĝin eldonis.

El **Mulhouse/Alsace** nin atingis 13paĝa faldprospekto kun 17 eksterordinare belaj kliŝoj. La franca teksto estas tradukita sur aldona multobligita folio. Ritt

Wollen Sie sich ein Urteil über **ESPERANTO** bilden? Dann lesen Sie

W. Th. Oeste:

## ESPERANTO MITTLER DER WELTLITERATUR

Das Werk bietet einen gedrängten Überblick über die **Struktur der internationalen Sprache** und beweist, daß Esperanto nationalen Sprachen ebenbürtig ist.

Der Hauptteil des Buches ist Esperanto-Nachdichtungen aus **sieben Sprachen** gewidmet. Die jeweils beigefügte wörtliche Verdeutschung zeigt, wie eng sich Esperanto an die Originalsprachen anschmiegt.

Die Neue Berner Zeitung schreibt:

... In diesem mit Unterstützung des Kultusministeriums Rheinland-Pfalz herausgegebenen Buch vermittelt der Verfasser zunächst eine Einführung in den Aufbau der Welthilfssprache und erklärt dann, weshalb sie besonders geeignet ist. Werke aus den Nationalsprachen wiederzugeben.

... Wir finden hier Horaz, Catull, Homer, Sappho, Ibsen, C. F. Meyer, Goethe, Ler-montow, Puschkin und Li Tai-pe ... Die Übertragungen beweisen mit überzeugender Klarheit, daß Esperanto als Mittler der Weltliteratur eine besondere Aufgabe hat ...

Das Buch, 96 S., brosch., erhalten Sie zum Preise von 4.50 DM vom

**Siegfried Ziegler Verlag**

(13b) München-Pasing  
Engelbertstraße 7  
Postscheck München 30454

oder durch Ihre  
Buchhandlung